

P A C O kaj J U S T E C O .

Monata revuo de la grupo B r u g g e .


Sekcio de Flandra Ligo Esperantista

- Prezidanto : Drs F. Roose, J. & M. Sabbestr. 12, Brugge-Tel. 51981.
- Sekretariejo : Roose-De Kersgieter, J. & M. Sabbestraat, 12, Brugge .
- Propagando : Maertens Gr., Nieuwstraat, 54, Assebroek .
- Poŝtkonto : 291429, Maertens Gr., Assebroek .

FONETIKAJ NOTOJ PRI ESPERANTO.

Ĉiuj personoj prononcas vortojn aŭ serion da vortoj, kiam ili volas esprimi siajn ideojn kaj ilin komuniki al aliaj. Sed ili neniam supozas kiom admiranda estas la funkciado de la voĉorganoj, kiam ili elparolas vorton. Tial mi volas detalan eksplikadon pri tiu-ĉi funkciado.

Por prononci vorton, estas necese ke oni disponas pri siaj voĉorganoj, el kiuj la pli interesaj estas :



Kiam oni ne parolas, la fento inter la voĉkordoj estas larĝe malfermita. Kiam oni parolas, la voĉkordoj aŭ tiel fermiĝas ke la spiro devas malfermigi la voĉkordojn, tiel ke tiuj-ĉi vibras-tiuokaze oni havas sonoratan sonon-aŭ la voĉfento estas mal-larĝe malfermita, tiel ke la spiro ne vibrigas la voĉkordojn - tiuokaze oni havas sen sonoratan sonon.


L A _ V O K A L O .

estas kompreneble sonora sono. La spiro do vibrigas la voĉkordojn kaj povas esti daŭrigita, ĉar ĝi povas senĝene pasi tra la gorgo kaj tra la buŝo. Fakte nur ekzistas unu vokalo : la a. Kiam oni prononcas a, la buŝo restas komplete malfermata, la lango kuŝas sur sia fundo. La a estas la baza vokala sono; ĉiuj aliaj vokaloj nu estas apudsonoj de la vokalo a.

Kiam, dum ke oni prononcas a, la antaŭbuŝo malgrandiĝas pro leviĝo de la lango kontraŭ la palato, oni prononcas respektive :

a - e - e - i - i


kiujn oni nomas : palatalaj vokaloj. Kiam oni prononcas palatalan vokalon, la lipoj longiĝas.




Kiam, dum ke oni prononcas a, la malantaŭbuŝo malgrandiĝas pro levigo de la lango kontraŭ la "velum", oni prononcas respektive :

a - o - o - ce - ce

kiujn oni nomas : velaraj vokaloj. Kiam oni prononcas velaran vokalon, la lipoj rondiĝas :



4



5

Inter la e kaj la o estas la eu, kaj inter la i kaj la oe la u, kiuj estas sonoj, kiujn oni prononcas kiel palatala vokalo, sed anstataŭ aŭ longigi, la lipoj rondiĝas kiel por prononci velaran vokalon; rimarku, ke oni prononcas la eu kiel eu en la nederlanda vorto "deur", kaj u kiel u en la franca vorto "mur".

vidu 2




6

En la indo-eŭropa fazo de la lingvoj, ĉiuj tiuj vokaloj estis distinge elparolataj. La lingvo sanskrita, plej flanka stadio al la indo-eŭropa pralingvo, havas jenajn vokalajn sonojn: a - à - i - î - u - ù - k.t.p.

En Esperanto ekzistas 5 vokaloj, kiujn oni devas prononci, kiel konsilas la aŭtoro de tiu-ĉi lingvo, inter la fermita kaj la malfermita sono.

La vokaloj en Esperanto kuŝas do tie :



Oni do prononcas : kompreneble, kaj ne kompreneble aŭ kompreneble. - donu, kaj ne donu aŭ donu.

LA KONSONANTO.

tiamaniere diferencigas de la vokalo, ke la spiro ne senĝene pasas tra la gorgo kaj la buŝo, sed estas ĝenata :

I° - per kompleta malfermiĝo de la buŝkavaĵo - tiuokaze oni parolas de Oklusivo (occlusio = ĝeno).

Se la spiro vibrigas la voĉkordojn, oni havas sonorajn oklusivon aŭ media; se ne, oni havas sensorajn oklusivon aŭ tenuis.

Ĉiu oklusivo povas esti akompanata de aspiracio (h, ĥ, estas aspiraciigitaj sonoj), oni havas sonorajn aspiraciigitajn oklusivon aŭ media aspirata aŭ oni havas sensorajn aspiraciigitajn oklusivon tenuis aspirata.

Laŭ la artikiga punkto en la buŝkavaĵo, oni distingas:

- A) Labialoj, kiam la "occlusio" okazas sur la lipoj, do p - b - ph - bh
- B) Dentaloj, kiam la "occlusio" okazas sur la dentoj, do t - d - th - dh
- C) Guturaloj, kiam la "occlusio" okazas sur la gorgoparioj.

Oni distingas :

1. kiam la lango leviĝas kontraŭ la palato, oni havas palatalajn guturalojn :

$\overset{h}{k}$ - $\overset{h}{g}$ - $\overset{h}{kh}$ - $\overset{h}{gh}$

Ekz. : kiam oni prononcas "kiel" : i estas palatala vokalo, kaj ĉar la i sekvas la k, la k devas adaptiĝi al la vokalo.

2. Kiam la lango leviĝas kontraŭ la "velum", oni havas velarajn guturalojn :

$\overset{h}{k}$ - $\overset{h}{g}$ - $\overset{h}{kh}$ - $\overset{h}{gh}$

Ekz. : kiam oni prononcas "gorilo" : o estas velara vokalo kaj ĉar la o sekvas la g, la g devas adaptiĝi al la vokalo.

3. Kiam la lango leviĝas kontraŭ la "velum", oni havas labio-velarajn guturalojn;

q^x - g^x - q^xh - g^xh

La signo x estas la labio-velara elemento aŭ "themis".

<u>Ekz.</u> : Lingvo indo-eŭropa	q^xn	gwèn
greka	$\overset{h}{k}^x$	guné
nederlanda	kw	ene
Lingvo indo-eŭropa	$snig^xhm$	snigwm
greka	$vifas$	nifas
nederlanda	sn	eeuw

En la indo-eŭropa lingvo oni havas do 20 oklusivojn.

Indo-eŭropaj oklusivoj :

	<u>Tenues</u>	<u>Mediae</u>	<u>aspiratae</u>	
			<u>tenues</u>	<u>mediae</u>
Labialoj	p	b	ph	bh
Dentaloj	t	d	th	dh
Guturaloj	palatalaj	$\overset{h}{k}$	$\overset{h}{kh}$	$\overset{h}{gh}$
	velaraj	k	kh	gh
	labio-velaraj	q^x	g^x	q^xh

En Esperanto nur restas kiel okluzivoj :

Esperantaj oklusivoj :

	<u>Tenues</u>	<u>Mediae</u>
Labialoj	p	b
Dentaloj	t	d
Guturaloj	palatalaj	$\overset{h}{c}$
	velaraj	k

kiel oni vidas, la nombro de la oklusivoj treege malgrandiĝis. La labio-velaraj guturaloj malaperis; ili iĝis labialoj, dentaloj kaj guturaloj velaraj.

N.B. En la indo-eŭropa lingvo ekestis 2 grupoj : la okcidenta kaj la orienta aŭ la Kentum-lingvoj kaj la Satam-lingvoj. La distingo inter tiuj 2 grupoj estas jena :

En la Kentum-lingvoj la guturaloj palatalaj, iĝis puraj velaraj k^x .

100 = en la lingvo	indo-eŭropa	k^x tom
greka		$\overset{h}{k}$ toiv ekaton
latina		centum
nederlanda		honderd
toĥara		kante
kelta		cèt

sed en la Satam-lingvoj la guturaloj palatalaj iĝis siblosonoj.

100 = en la lingvo	indo-eŭropa	k^x tom	k^x tm
sanskrita		satam	satem
slava ekz.rusa		sto	
balta ek.litova		šimtas	simtas

En la Kentum-lingvoj, la "themis" de la guturaloj labio-velaraj restas, en la Satam-lingvoj tio ne okazas.

Wie ? en la nederlanda lingvo.

Quis ? en la latina lingvo.

Kah ? en la sanskrita lingvo.

Rimarku, ke oni povas daŭrigi la vokalojn, sed NE la oklusivojn, ĉar ĉiam estas baro.

La esperanta litero c = dentalo + siblosono t + s

II° - Semi-oklusivojn oni nomas oklusivojn, kiuj estas prononcataj kun ne komplete fermita buŝo, tiel ke la spiro povas pasi trae kaj povas esti daŭrigata.

Esperantaj semi-oklusivoj :

	<u>Tenues</u>	<u>Mediae</u>
labialaj	f	v
palatalaj	j	ĵ

III° - Kiam la "occlusio" ne estas komplete, la spiro povas sibli inter la dentoj, kaj tiukaze oni havas siblosonon, kiun oni povas daŭrigi.

Esperantaj siblosonoj :

	<u>Tenues</u>	<u>Mediae</u>
dentalaj	s	z
palatala	ŝ	

IV° - Inter la oklusivoj kaj la semi-oklusivoj troviĝas la fluantaj sonoj aŭ "Liquidae" : l kaj r, kiuj estas prononcataj kun tremo de la langopinto. La "liquidae" povas esti daŭrigataj kiel vokaloj, aŭ ne, kiel konsonantoj. En la unua kazo oni nomas ilin "liquidae" vokalaj aŭ semi-vokaloj, kaj oni skribas l kaj r por distingi ilin je l kaj r, kiuj estas "liquidae" konsonantaj.

Indo-eŭropaj "liquidae" :

	<u>vokalaj</u>	<u>konsonantaj</u>
dentalaj	l	l
kerebralaj	r	r

(Kerebrala = kun forta tremo de la langopinto).

Esperantaj "liquidae" :

	<u>Konsonantaj</u>
dentala	l
kerebrala	r

V° - Kiam, dum ke oni prononcas sonorajn oklusivon b; d, g, la uvulo ne fermiĝas la nazkavaĵon, parto de la spiro iras tra la nazkavaĵo, kaj en tiu kazo oni havas nasajn sonojn aŭ Nasalojn, kiuj kompreneble ankaŭ estas sonoraj.

Indo-eŭropaj nasaloj :

guturala	ŋ	(=ng= nasaligita formo de g).
palatala	ɲ	(=nj= nasaligita formo de j).
dentala	n	(nasaligita formo de d).
labiala	m	(nasaligita formo de b).

Esperantaj nasaloj :

dentala	n
labiala	m

La Esperanta lingvo havas la 4 indo-eŭropajn nasalajn sonojn, sed ne havas specialan signon por la guturala kaj la palatala nasaloj, kiujn ĝi do skribas : ng, nj.

N.B. Konsonantoj, kiuj komencas silabon, nomiĝas Eksplisivoj, ĉar ili estas forte artikigataj. Konsonantoj, kiuj ne komencas silabon, nomiĝas Implosivoj : ili ne estas tiel forte artikigataj ol la eksplisivoj.

Ekz. : Eksplisivo : Tasko.

Implosivo : Atlaso.

(Verkis : Martens Roger)

"FULMOBRILLOJ EL LA E° MOVADO".

I. La interfratiĝo de la esperantistoj.

En multaj gazetoj (i.a. en "Pola Esperantisto", "Heroldo", k.a.) oni skribis pri la temo : "Nia rilato al germanaj esperantistoj". Ni mem volis jam pritrakti la temon kaj efektive preparis artikolon, sed aŭdigis tiom da voĉoj kiuj feliĉe defendis la ĝustan kaj justan starpunkton ke ni juĝis ne necesa ankoraŭ aperigi nian skribaĵon. Tamen tion-ĉi ni volas eldoni. Estas notinda fakto ke la esperantistaro konscias la internan ideon de E°. Ĝi pruvis tion, asertante ke jes oni devas bone rilati kun germanaj esperantistoj, almenaŭ si ili estas veraj esperantistoj. Eble oni kontraŭargumentos : "ne nur la esperantistoj, sed ankaŭ aliaj homoj prononcas sin favore al bonaj

interrilatoj." Mi scias. Sed mi scias ankaŭ la ruzecon de la homoj. La homoj plejparte estas artfarite dividitaj en partioj. Kaj ili ŝatos bonajn interrilatojn kun tiuj germanoj kiuj havas saman politikan, religian, socian aŭ alispecan kredon. Dum ke ili daŭre malbenos la alipensantajn germanojn ! Sed la esperantistaro volas interamikiĝon kun germanaj veraj esperantistoj, ekster ĉiu opinio aŭ konvinko. Jen kio feliĉigus la koron de Zamenhof. Sed jen mi havas ankoraŭ malgrandan, tamen gravan demandeton. Se la esperantistaro konus la opiniojn de ĉiuj germanaj veraj esperantistoj, ĉu ankoraŭ tiom da voĉoj aŭdiĝus por postuli bonan interrilaton ? Alivorte, ĉu estas pro reciproke amo de homo al homo, pro tuthomara solidareco (devus esti tiel) aŭ ĉu estas nur ĉar la cirkonstancoj estas pli favoraj al interamikiĝo ke la esperantistoj de la aliancanoj emas al repaciĝo kun la tiel nomata malamiko ? La dua eventualeco estas kompreneble malpli bela ol la unua. Tamen estas jam io. Efektive ju pli bonaj estas la cirkonstancoj en kiuj la homoj vivas, des pli la bonaj emoj en la homo superas la malbonajn. La esperantamovado oni certe rajtas nomi "bona cirkonstanco". Kaj per ĝi, eble multaj venos al la supre skizita ideala animstato, inda je vera Kristano kaj Zamenhofano.

II. Kuraĝaj vortoj.

Rilate la supran problemon, ni citas kuraĝajn vortojn el "Heroldo de Esperanto", 15/XII/46 -p.2 -kol.1. :

"Por konkludi, ni atentigu pri nur unu fakto, kiu ankaŭ povas multon klarigi koncerne la okazintaĵojn en la pasinta tempo : pri la kunpremiteco de la germana popolo sur relative malvasta teritorio. Antaŭ la milito loĝis sur sovetia teritorio 9 homoj sur unu kvadrata kilometro (en ĝia eŭropa parto 22), sur usona teritorio 15, sur brit-imperia 18, sur franc-imperia 9, sed sur germana teritorio (antaŭ la anekso de Aŭstrio) 142. Tiam la tuta loĝantaro de Germanujo estis 67 milionoj; intertempe la proporcio fariĝis eĉ pli malfavora, ĉar nun 67-70 milionoj da germanoj devas loĝi sur teritorio eĉ pli limigita. Komento superflua. Oni povas esprimi la opinion ke tio estas la justa puno por la teruraj krimoj faritaj en la nomo de la germana popolo. Sed ĉu en ĝi ne embuskas nova danĝero ? Eble nur la kreo de Mondfederacio de ĉiuj ŝtatoj en la mondo, kun mondcivitaneco, mondpasporto kaj libera moviĝado tra la kvin kontinentoj, ankaŭ por la infanoj kaj nepoj de la nunaj germanoj, povos konduki el tiu dilemo."

III. Parolu en Esperanto.

Sekve de nia artikolo "Parolu en Esperanto" en la antaŭa n° de nia revuo, ni ricevis karton de la eminenta Nederlanda Sano Sro Kalma, kiu diras ke li fakte nenion alian volas diri ol tion ĉi : "ke ni bone atentu ĉiujn cirkonstancojn se ni volas paroli en E° por propagando kaj ke ni ankaŭ atentu la manieron laŭ kiu ni faras ĝin." Mi nun tute akordiĝas, kaj fakte havas saman opinion.

HET TAALPROBLEEM IN DE NAORLOGSCHE ORGANISATIE.

door Dr. Wilhelm Solzbacher, uit "American Esperantist"-May-June
vertaald door medelid Jozef Hautekiet. (vervolg) 1945.

Gezien dat de "Congresses of Geography" gehouden te Rio de Janeiro, Recife, Salvador, Belo Horizonte, Paraiba, Victoria en Florianopolis resoluties betreffende het uitbreiden van deze neutrale taal, hebben goedgekeurd en toegejuicht en suggereerden de werken der Braziliaansche schrijvers te vertalen in het Esperanto. legt het 10e Braziliaansch "Congress of Geography" den nadruk op den steun, gegeven aan het Esperanto door de voorgaande congressen, en drukt den wensch uit opdat aardrijkskundigen de internationale hulptaal meer en meer zouden gebruiken voor het verspreiden van hun uitgaven.

Er mag aan herinnerd worden dat op de "League of Nations Assembly" de Braziliaansche afgevaardigde de eerste was om een aanbeveling te teekenen betreffende het opnemen van het Esperanto in de Scholen. Deze Braziliaansche afgevaardigde (hij was een termijn Vice President van de "League Assembly") was Dr. Rodrigo Octavio Langard de Menezes, gewezen cabinet Minister en gewezen

voorzitter van de Braziliaansche letterkundige accademie; zijn overlijden in 1944 op den leeftijd van 78 jaar, was een groot verlies voor de Esperanto beweging.

Wegens verscheidene redenen zijn in de U.S. de meeste vereenigingen en schrijvers die belang stellen in internationale zaken en de naoorlogsche inrichting onbedrijvig gebleken bij het kiezen van het Esperanto als een neutrale internationale taal van internationale communicatie en wereldorganisatie. Velen van hun willen wel aannemen dat het Esperanto de eigenschappen er voor bezit. Het is aan de Esperantisten het klaarder voor te stellen, doelmatiger en meer overtuigend dan in het verleden. De ondervindingen van den oorlog hebben honderdduizenden Amerikanen geleerd dat er een taalprobleem op te lossen is in de naoorlogsche wereld. Nu is het de tijd om de openbare opinie te bewijzen dat het aannemen van het Esperanto de logische en uiteindelijke weg is tot het oplossen van het internationaal taalprobleem.

o o o o o o o o

! ! ! ! ! ! ! !

ANGULO DE LA SERĈEMULOJ .

Nota de la prizorganto :

Kiam mi je la fino de Decembro 1944, pro profesiaj kialoj eksterlande kaj poste enlande, devis rezigni la prizorgadon de la enigmo-angulo en nia revuo, mi tre bedaŭris la fakton, ĉar ne estis anstataŭanto por repreni la taskon. Mi arde esperis kiel eble plej baldaŭ repreni la iam akceptitan taskon. Tiu espero efektiviĝis finfine je komenco de la jaro 1947. Ek de tiam mi denove regule prizorgos la rubrikon. Antaŭ ol repreni la laboradon, mi foje trafoliumis la jam ampleksan paperamason, rilate al la angulo de la serĉemuloj (mi bedaŭras ke miaj anstataŭantoj ne daŭrigis statistikon de mi faritan) dum la 3 unuaj jaroj de la aperigo de nia revuo. Jen rezultato :

Dum 38 monatoj da seninterrompa prizorgado de la rubriko la redaktoro de la angulo aperigis 26 fojojn enigmojn.

Li ricevis : 22 fojojn solvojn (do 4 fojoj eĉ neniu respondis)

Dum jaro 1942 : ok gepartoprenintoj

" " 1943 : kvar "

" " 1944 : tri "

Plej granda nombro de ensendaĵoj : sep dum monatoj Decembro 1941 kaj Januaro, 1942.

Plej malgranda nombro : unu dum Januaro, Februaro, Aprilo kaj Decembro 1943, kaj Aprilo, Decembro 1944.

Plej multfoje partoprenis : Martens R.

Unufoje partoprenis : M.TH. Roose - R.A. Roose kaj E. Cortvriendt.

Resumo : Oni do konstatas ke la intereso por kaj la partoprenado al tiuj konkursoj, tute ne sufiĉas. Tamen la utileco de solvado de enigmoj estas granda rilate al pliriĉiĝo de ĉies mondlingva vort-trezoro de la gepartoprenantoj.

Mi esperas ke ek de nun almenaŭ ĉiuj geklubanoj partoprenos.
La prizorganto.

Nota de la redakcio :

La anstataŭantoj efektive ne faris statistikon, sed regule publikigis klasifikon, kiu estas ankaŭ fidinda spegulo de la partoprenado, ĉar grave erarajn solvojn (kiuj do ne meritas poentojn) oni ne ensendis. Laŭ tiuj klasifikoj plej partoprenis : la ekspri-zorganto mem (kiu nun denove prizorgas) kaj A. Spruytte. Partoprenis ankaŭ ofte : M.TH. Roose - G.Mallet.

A. POR KOMENCANTOJ : Enigmo 1.

Serĉu en la suba ekvacio la valoron (aŭ signifon) de litero X, sciante ke :

$$X = (A - B) + (C - D) + (E - F) + (G - H) + (I - J) + (K - L) + (M - N) + (O - P).$$

Jen la difinoj :

X = laŭdinda idealo.